

Esperanto - La Bitbulteno 87

esperanto.es

LIBRO DE DELIBES TRADUCIDO AL ESPERANTO

Se acaba de publicar la traducción al esperanto de una de las principales obras del escritor castellano Miguel Delibes, *Señora de rojo sobre fondo gris*. El título en esperanto es *SinJORINO en ruĝo sur griza fono*. El traductor de la obra es un conocido autor y traductor en esperanto, Antonio Valén, y la editorial responsable es Mondial, con la colaboración de la [Fundación Esperanto](#).

Señora de rojo sobre fondo gris es una de las obras más personales de Delibes, con claras referencias autobiográficas, y un homenaje a su esposa, Ángeles, fallecida con solo 51 años.

Se trata de la primera novela de Delibes traducida a la lengua internacional. La [traducción de obras literarias al esperanto](#) es una de las actividades más características de la cultura en esta lengua ya desde el comienzo de su historia. Numerosos autores españoles han sido [traducidos al esperanto](#), entre los cuales muchos contemporáneos, y esta publicación viene a llenar un hueco, poniendo al alcance del público internacional a un autor tan importante como Miguel Delibes.

El libro puede adquirirse en el [servicio de libros](#) de la Federación Española de Esperanto y también en numerosos comercios en línea.



APÚNTATE AL CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO 2023

A finales de abril termina el primer plazo para apuntarse al Congreso Español de Esperanto, que, como es sabido, tendrá lugar este año en Sevilla, entre el 12 y el 15 de octubre.

Las primeras informaciones y el boletín de inscripción pueden encontrarse en [esta web](#).




CONGRESOS DE ESPERANTO EN VERANO

Más de mil personas (incluyendo más de cuarenta procedentes de España) se han inscrito ya en el Congreso Universal de Esperanto, que este año tendrá lugar en Turín (Italia), del 29 de julio al 5 de agosto. Se espera una amplia asistencia, tras las perturbaciones ocasionadas estos últimos años por la pandemia. Se pueden encontrar todas las informaciones, incluyendo la manera de inscribirse, en la web del [comité organizador](#) y en la de la [Asociación Universal de Esperanto](#).

El [79º Congreso Juvenil Internacional de Esperanto](#) tendrá lugar en Lignano Sabbiadoro, ciudad turística, junto al mar, también en Italia, entre el 5 y el 12 de agosto, justo tras la finalización del Congreso Universal. Está organizado por la Asociación Internacional de Jóvenes Esperantistas ([TEJO](#)). En el mismo lugar y fechas tendrá lugar el [56º Congreso](#) de la Liga Internacional de Profesores Esperantistas (ILEI).

El [96º congreso](#) de la Asociación Anacionalista Mundial (SAT) tendrá lugar de forma presencial entre el 18 y el 25 de julio, en un centro cultural gestionada por esperantistas en Francia, el castillo Gresillon.

Además, para quien tenga la oportunidad de viajar, numerosos encuentros y congresos están previstos para las próximos meses en todo el mundo. Puedes informarte sobre las posibilidades en la web [EventaServo](#).



EXPOSICIÓN SOBRE EL ESPERANTO EN ASPE

Este 29 de abril se clausura la [exposición "Esperanto, idioma internacional"](#) que durante estos días ha podido visitarse en Aspe (Alicante, Comunidad Valenciana). El lugar es la Sala de Exposiciones José Terol Romero, en el teatro Wagner, y puede visitarse de 19,00 a 21,00 horas.

En la inauguración participaron la concejala de Cultura, Turismo y Fiestas, Rosa María Ruiz Martínez, el director de cultura, Manuel Benítez Bolorinos, y Ángel Miralles Pastor, miembro de la asociación de esperanto de la provincia de Alicante, con presencia de medios de comunicación locales.

En mayo el grupo alicantino ha organizado un curso de esperanto en El Alted (en la vecina Elche)



“Esperanto. Idioma internacional”

Inauguración: viernes 14 de abril a las 20 h.

Abierta hasta el 29 de abril

Horario de visitas: de martes a sábado
de 19 a 21 h.



ESPERANTO EN EL DÍA DEL LIBRO

El Liceo Madrileño Esperanto fue invitado de nuevo a participar en la Noche de los Libros, que organiza la Comunidad de Madrid todos los años alrededor del Día del Libro. En esta ocasión se decidió aprovechar el 50º aniversario de la muerte del gran poeta chileno Pablo Neruda para presentar una [exposición](#) de libros de escritores latinoamericanos traducidos al esperanto. La fecha fue el 21 de abril y el lugar la sede de la Federación Española de Esperanto.

También en esas fechas en Madrid el esperanto tuvo visibilidad en la tradicional lectura de Don Quijote organizada por el Círculo de Bellas Artes. El 20 de abril por la tarde dos esperantistas declamaron sendos fragmentos de la obra. Puedes verlos [aquí](#) y [aquí](#).

Por otra parte, la Asociación Catalana de Esperanto estuvo presente en las celebraciones de la Diada de Sant Jordi, en Barcelona y Sabadell, con sendos [puestos](#), en los que se mostraron las ediciones más nuevas, así como libros y otros materiales, y se informó sobre el esperanto y las próximas actividades y cursos previstas.



MIGUEL FERNÁNDEZ EN EL ANIVERSARIO DE LORCA

Durante las últimas semanas el poeta esperantista Miguel Fernández ha participado en varias presentaciones en homenaje a Federico García Lorca, con ocasión del 125 aniversario de su nacimiento. Durante el fin de semana del 25 y 26 de marzo fue invitado a participar en la presentación del corto [“La camisa blanca”](#), dirigido por Bego Guerrero, sobre la vida y muerte del poeta. El sábado 25 participó en una tertulia en el Ateneo de Madrid. El 26 el lugar elegido fue la [Fundación Anselmo Lorenzo](#), del sindicato CNT.

También durante la mencionada ["Noche de los Libros"](#), el 21 de abril, en la [Casa San Cristóbal de Fundación Montemadrid](#), en el distrito de Villaverde, se programó un encuentro con Miguel con el título "Charlamos sobre Lorca", con alumnos del I.E.S San Cristóbal de los Ángeles, y también con asistencia de otro público. El Liceo aprovechó la ocasión para donar varios libros sobre el esperanto a la biblioteca de esa institución.

Miguel fue presentado en todos los casos como poeta en esperanto y traductor de Lorca a la lengua internacional.





CLAUSURA DE LA LIGA DE DEBATE ESCOLAR EN FUENLABRADA

El 29 de marzo se clausuró el concurso de debate escolar en Fuenlabrada (parte de una iniciativa más amplia en los ayuntamientos del sur de Madrid), del que informamos en anteriores Bitbultenos, y que tenía como tema el posible papel del esperanto en la Unión Europea. El debate mostró un alto nivel, con un magnífico trabajo de los alumnos y profesores involucrados.

En la entrega de premios participaron el secretario de la Federación Española de Esperanto, Manuel Parra, y el director de la Fundación Esperanto, José Antonio del Barrio, que se dirigieron a los asistentes para felicitar a los participantes y agradecer la iniciativa del ayuntamiento. HEF recibió una placa conmemorativa, entregada por el concejal de educación, Isidoro Ortega.



APROVECHA LAS VENTAJAS DE APUNTARTE A LA FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO

Las personas que estos días están rellenando la Declaración de la Renta habrán observado las ventajas fiscales del pago de cuotas y donaciones a la Federación Española de Esperanto, como entidad de utilidad pública. Puede llegar al 80% de la contribución, dependiendo de las circunstancias personales del declarante.

Junto con otras ventajas (por ejemplo, la rebaja de cuotas al Congreso Español de Esperanto), puede merecer la pena hacerse socio de la Federación, además (y sobre todo) de que así contribuyes a la [realización de nuestros fines](#) de promoción de la lengua internacional.

Puedes inscribirte en [este enlace](#) en red. ¡Te esperamos!



LIBRO DE DELIBES TRADUKITA AL ESPERANTO

Aperis la traduko al Esperanto de unu el la ĉefaj romanoj de la kastilia verkisto Miguel Delibes. La romano titoliĝas *Sinjinorino en ruĝo sur griza fono* (*Señora de rojo sobre fondo gris*), kaj ĝi estas unu el la plej personaj verkoj de Delibes, kun klaraj membiografiaj referencoj kaj omaĝo al lia edzino, Ángeles, forpasinta nur 51-jaraĝa.

Ĝi estis tradukita de la konata aŭtoro kaj tradukisto Antonio Valén, kaj eldonita de [Mondial](#), kunlabore kun la zaragoza [Fondaĵo Esperanto](#).

Ĝi estas la unua tradukita al Esperanto verko de [Miguel Delibes](#) (1920-2010), eble la plej populara verkisto en Kastilio en la mezo de la 20a jarcento.

La libron oni povas akiri en la [libroservo](#) de Hispana Esperanto-Federacio, [ĉe UEA](#) kaj en aliaj retaj vendejoj.



ALIĜU AL LA HISPANA ESPERANTO-KONGRESO 2023

Fine de aprilo fermiĝas la unua aliĝperiodo por la Hispana Esperanto-Kongreso, kiu, kiel sciante, okazos ĉijare en Sevilo inter la 12a kaj 15a de oktobro.

La unuaj informoj kaj la aliĝilo troviĝas en [tiu ĉi retejo](#).



SOMERAJ INTERNACIAJ KONGRESOJ

Jam pli ol mil homoj (inklude de pli ol kvardek venontaj el Hispanio) aliĝis al la Universala Kongreso de Esperanto, kiu ĉijare okazos en Torino (Italio), inter la 29a de julio kaj la 5a de aŭgusto. Oni atendas ampleksan ĉeestantaron, post la problemoj okazigitaj de la monda pandemio. Oni povas trovi ĉiujn informojn, inklude de la manieroj aliĝi, en la retejoj de la [LKK](#) kaj de [UEA](#).

La [79-a Internacia Junulara Kongreso](#) okazos en Lignano Sabbiadoro, apudmara loko ankaŭ en Italio, inter la 5a kaj la 12a de aŭgusto, tuj post la fino de la UK. Ĝin organizas internacia teamo de spertaj eventorganizantoj de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO). Ĝi okazos komune kun [la 56-a Kongreso](#) de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI).

La [96a SAT-kongreso](#) okazos ĉeeste en unu el la kulturdomoj mastrumataj de francaj esperantistoj: la kastelo Greziljono. La kongreso daŭros inter la 18a kaj la 25a de julio 2023.

Krom tiuj, multaj aliaj kongresoj kaj renkontiĝoj estas programataj tutmonde. Vi povas scii pri multaj el ili pere de la retejo [EventaServo](#).





EKSPOZICIO PRI ESPERANTO EN ASPE

La venontan 29an de aprilo fermiĝos la [ekspozicio "Esperanto, idioma internacinal"](#) kiu dum tiuj ĉi pasintaj tagoj estis vizitebla en Aspe (provinco Alikanto, Valencia regiono). La loko estas salono de eksponaĵoj en la loka teatro Wagner, kaj ĝi estas vizitebla inter 19,00 kaj 21,00 horoj.

La inaŭguron partoprenis la urbkonsilisto pri kulturo, turismo kaj festoj, Rosa María Ruiz Martínez, la direktoro pri kulturo, Manuel Benítez Bolorinos, kaj Ángel Miralles Pastor, membro de la asocio de Esperanto de la provinco de Alikanto, kun ĉeesto de la lokaj amaskomunikiloj.

En majo la alikanta grupo organizos kurson de Esperanto en la urbo El Alted.



ESPERANTO EN LA TAGO DE LA LIBRO

Madrida Esperanto-Liceo estis denove invitita partopreni la Nokton de la Libroj, ĉiujare organizatan de la Madrida regiona registaro, ĉirkaŭ la Internacia Tago de la Libro, en aprilo. MEL elektis kunmemori la kvindekan datrevenon de la morto de la ĉilia poeto Pablo Neruda por prezenti [ekspozicion de libroj](#) de latinamerikaj verkistoj tradukitaj al Esperanto. La dato estis la 21a de aprilo, kaj la loko, la sidejo de Hispana Esperanto-Federacio.

Ankaŭ en Madrido, Esperanto denove partoprenis en la sinsekva legado de la verko Don Quijote, organizita de la kulturinstitucio Círculo de Bellas Artes. La 20an de aprilo vespere du esperantistoj laŭtlegis kelkajn paragrafojn. Vi povas ilin spekti [tie ĉi](#) kaj [tie ĉi](#).

Aliflanke, Kataluna Esperanto-Federacio denove [starigis budojn](#) en la Tago de la Libro (tradicie nomata Tago de Sankta Georgo en Katalunio, la 23an de aprilo), en Barcelono kaj Sabadell. En ambaŭ budoj, la asocio disvendis la plej freŝajn eldonaĵojn kaj ankaŭ aliajn elektitajn librojn, krom diversajn aliajn objektojn, kaj profitis la okazon por informi pri Esperanto kaj pri venontaj kursoj.



MIGUEL FERNÁNDEZ PRELEGAS PRI LORCA

Dum la lastaj semajnoj Miguel Fernández partoprenis en diversaj prezentadoj omaĝe al Federico García Lorca, okaze de la 125a datreveno de ties naskiĝo. En la semajnfino de la 25a kaj 26a de marto oni invitis lin je la prezentado de mallonga filmo [“La camisa blanca”](#) (La blanka ĉemizo), reĝisorita de Bego Guerrero, pri la vivo kaj morto de la poeto. La sabaton 25, li partoprenis kunbabiladon en la Ateneo de Madrido. La 26an la loko elektita estis la [Fondaĵo Anselmo Lorenzo](#), de la sindikato CNT.

Ankaŭ okaze de la menciata [“Nokto de la Libroj”](#), la 21an de aprilo, en la [Casa San Cristóbal de Fundación Montemadrid](#), en la distrikto Villaverde, oni programis renkonton kun Miguel kun la titolo "Ni babilu pri Lorca", kun lernantoj de mezlernejo I.E.S San Cristóbal de los Angeles, kaj ankaŭ kun ĉeesto de ĝenerala publiko. MEL profitis la okazon por donaci plurajn librojn pri Esperanto al la biblioteko de tiu institucio.

Miguel estis prezentita en ĉiuj kazoj kiel esperantista poeto kaj tradukisto de Lorca al la internacia lingvo.



FERMO DE LA LERNEJA DEBATO EN FUENLABRADO

La 29an de marto estis fermita la konkurso pri debato en Fuenlabrado (parto de pli ampleksa rondo inter lernejoj en la municipoj de la suda zono de la madrida regiono), pri kiu ni informis en pasintaj bultenoj, kaj kiu temis pri la rolo de Esperanto en la Eŭropa Unio. La debato evidentiĝis tre altnivela, kun granda laboro de la lernantoj kaj instruistoj enplektitaj.

La disdonon de premioj ĉeestis la sekretario de Hispana Esperanto-Federacio, Manuel Parra, kaj la direktoro de Fondaĵo Esperanto, José Antonio del Barrio, kiuj alparolis la ĉeestantojn por gratuli la partoprenintojn, kaj por danki la iniciaton de la urbestraro. HEF ricevis kunmemoran donacon, fare de la skabeno pri edukado, Isidoro Ortega.



PROFITU LA AVANTAĜOJN FARIĜI MEMBRO DE HEF

La homoj kiuj nun penas super la prezentado de la fiska deklaro en Hispanio sendube rimarkis la fiskajn avantaĝojn de la pago de kotizoj kaj donacoj al Hispana Esperanto-Federacio, kiel asocio deklarita "de publika utileco". Ĝi povas atingi la 80-procentan rabaton, depende de la personaj cirkonstancoj de la deklaranto.

Kune kun aliaj avantaĝoj (kiel la rabato en la kotizo al la Hispana Esperanto-Kongreso),

meritas la penon esti ano de la Federacio, krom ke (kaj ĉefe) tiel vi [kontribuas al la plenumo](#) de la celoj de antaŭenigo de la internacia lingvo.

Vi povas aliĝi en [tiu ĉi reta ligilo](#). Ni atendas vin!

esperanto.es